



LINGVO INTERNACIA

MONATA GAZETO POR LA LINGVO ESPERANTO.

Eldonata je la nomo de l' Klubo Esperantista en Upsala.

Kosto de abono por jaro: Skandinavaj kronoj 4,00 = germanaj markoj 4,50 = frankoj 5,75 = rubloj 2,00 = portugalaĵaj rejsoj 1000 = brazilaj rejsoj 2000 = aŭstro-hungaraj kronoj 5,50 = dolaroj 1,25 = ŝilingoj 4 1/2.

Pago por anoncoj: 15 oeroj = 15 pfenigoj = 20 centimoj = 8 kopekoj = 20 heleroj, por duonpaĝa petilinio. — 10% rabato por duonjaraj, 25% rabato por tutjaraj anoncoj. Ĉe granda anoncado ankoraŭ pli da rabato laŭ reciproka konsento.

Adreso de l' redaktoro: PAUL NYLÉN, UPSALA, Sverige (Svedujo).

Adreso de l' administrado: Presejo de PAUL DE LENGYEL, SZEGZÁRD, Magyarország (Hungarujo).

Kun manuskriptoj kaj ĉio tuŝanta la tekston oni sin turnu al la redaktoro; pri abono, ekspedado, anoncoj kaj ĉiuj monaj aferoj oni devas turni sin al la presejo.

TION ĈI VOLU LA *

* KUNLABORANTOJ LEGI!

(Sub tiu ĉi rubriko ni legas en la februara numero de „L' Espérantiste“ kelkajn konsilojn, kiuj estas egalgrade rimarkindaj ankaŭ al la kunlaborantoj de L. I. Tial ni ne povas al ni rifuzi citi ilin rilate al L. I.)

Oni ofte skribas al ni por peti, ĉu oni povas sendi verkojn por nia gazeto. Kompreneble jes; kaj eĉ ni estas tre dankaj al la personoj, kiuj tiel helpas nin por nia gazeto. Sed estas necese, ke ni konigu niajn dezirojn pri tio ĉi. Tiamaniere ni ne bezonos plu skribi al ĉia demandinto longajn specialajn leterojn; kaj aliparte la esperantistoj scios, kion ili devas fari por kunlaboradi sukcese en nia gazeto.

1e. La stilo devas esti bona kaj absolute korekta. Se en verko estas nur kelkaj malbonaĵoj, ni tre volonte prenas sur nin fari la necesan korektadon. Sed

se la stilo estas tiel malperfekta, ke la plibonigo postulas grandan laboron, ni ne povas ĝin fari.

2e. Ni deziras nur prozajn verkojn. La versaĵoj estos ĉiam maloftaj esceptoj en nia gazeto. La kaŭzo de tio ĉi ne estas, ke ni malŝatas la poezion, ho tre certe ne! Sed la celo de nia gazeto estas precipe doni al la legantoj modelojn de stilo, liveri al ili la vortojn kaj esprimojn bezoneblajn. La versaĵoj ne povas bone utili por tiu ĉi celo; ĉar oni toleras en la versoj manierojn ne tute regulajn, kiujn oni ne povas permesi en la prozo. Aliparte, se estas en verso io malboneta, oni ne povas facile korekti ĝin, pro la neŝanĝebla nombro de la silaboj. — — —

Ni deziras ankaŭ, ke la amikoj bone elektu la objektojn: ili sendu al ni raportojn pri vojaĝoj, priskribojn pri kutimoj, ceremonioj, festoj specialaj de sia lando, rakontetojn ŝercajn kaj amuzajn. Ili evitu la versaĵojn, ĉar plej ofte versaĵo tradu-

kita en prozon perdas la plej grandan parton de sia valoro. Ili ankaŭ evitu la verkojn, kies precipa merito estas en la stilo, ĉar tiaj verkoj estas tre malfacile tradukeblaj kaj postulas tre grandan sperton kaj ekzercitecon en nia lingvo. — Fine ili ne forgesu, ke ni rifuzas lokon en nia gazeto al ĉio, kio povas ofendi la bonmorojn kaj la respekton devatan al la legantaro, en kiu ni havas la plezuron kalkuli multajn virinojn, fraŭlinojn kaj eĉ infanojn.

Se la amikoj konsentos sekvi tiujn konsilojn, ili utile helpos nin kaj havos pli ofte la plezuron vidi siajn verkojn enpresitajn en nia gazeto.

La redakcio.

KRONIKO.

.....

La Klubo Esperantista Stokholma la 18-an de januaro 1900 havis sian unuan kunvenon de tiu ĉi jaro. Krom la ordinara aferoj, elektoj k. t. p., oni preparolis la staton de la gazeto „Lingvo Internacia“. Kelkaj el la parolintoj esprimis la dezirindecon de pli ampleksa anoncado en la gazeto, por ke ĝiaj enspezoj per tia maniero pligrandiĝu kaj la ekonomiaj malfacilaĵoj de la gazeto, kiuj ĝis nun multe malhelpis ĝin, estu forigitaj; ĉar la ĉefa kondiĉo, por ke la malnovaj abonantoj reabonu kaj varbu novajn kaj en aliaj rilatoj helpu ĝin, estas tio, ke ĝi akurate kaj regule eliradu.

Pri la *dua kunveno*, havita la 6-an de marto, oni legis sciigojn en preskaŭ ĉiuj Stokholmaj gazetoj. N° 55 de „Aftonbladet“ (7. marto) enhavis la sekvantan raporton: „La Klubo Esperantista Stokholma kunvenis la vesperon de

tiu ĉi mardo en la kafejo en 18 Regeringsgatan sub la prezido de civil-inĝeniero F. Langlet.

Post ke la kalkula raporto de la revizoroj estis legata kaj al la ekziganta Komitato estis donita plena deŝarĝigo, la nova administranta Komitato por 1900 estis elektata. Fariĝis: prezidanto post inĝeniero Langlet, kiu rifuzis sian reelekton, fil. lic. E. Etzel; sekretario s-ro P. Ahlberg (reelektita), adreso Döbelnsgatan 50; kasisto la financeja notario A. Roswall (reelektita) kaj helpantaj komitatanoj s-rinoj Fraenckel kaj Krikortz.

Estis priparolata la propono el la Klubo Esperantista Upsala, metita de kand. P. Nylén, pri la fondado de Skandinava Esperanta Societo kun propra gazeta organo, kiu propono estis ripozigita ĝis la venonta kunveno.“

La redaktoro de L. I., kiu alestis ĉe ambaŭ kunvenoj, kun granda ĝojo povis konstati la vivemecon kaj tre rapidan kreskadon de la Klubo Stokholma, kiu jam multe faris kaj kies multaj eblecoj donas la plej bonajn promesojn por la efika propagando de nia lingvo internacia.

*

La Klubo Esperantista Upsala kunvenis la 1-an de marto 1900. Pri tio ni citas artikolon enpresitan en N° 1473 de „Upsala Nya Tidning“ (2. marto). Multe el tio, kion raportas tiu ĉi artikolo, estas jam konata por la malnovaj esperantistoj kaj abonintoj de nia gazeto, sed ni tradukas la tutan artikolon, kiu sendube havas intereson por la novaj legantoj de L. I. Ĝi diras: „La Klubo Esperantista Upsala havis hieraŭ vespere sian unuan ordinaran kunvenon de l' jaro, kie estis reelektitaj kiel membroj de l' administranta Komitato s-roj Vald. Langlet prezidanto,

Paul Nylén vic-prezidanto, A. Sandborg kasisto, kaj sekretario estis novelektita s-ro Sig. Agrell post s-ro O. Holmqvist, kiu rifuzis reelekton.

La vic-prezidanto raportis mallonge pri la agado de la Klubo dum la pasinta jaro, el kio estis konata, ke la intereso de l' publiko por Esperanto estas en konstanta kreskado ne sole en Svedujo sed ankaŭ en Finnlando, pro kio la Klubo estis devinta presigi novajn eldonojn de siaj lernolibroj kaj vortaroj. La Komitato estis respondinta dum la jaro ĉirkaŭe 500 skribaĵojn pri Esperanto. — La gazeto „Lingvo Internacia“, kiu dum kvar jaroj estis eldonata en Upsalo, estas de nun presata kaj dissendata el Szegzárd en Hungarujo, sed estas ankaŭ nun redaktata de l' vic-prezidanto de la Klubo.

Proponita projekto pri la fondado de skandinava Esperanta societo, kies plej proksima celo estas krei gazeton por la propagando de Esperanto en la nordaj landoj kaj produktadi dana-norvegajn lernolibrojn, ricevis vivan aprobon kaj subtenon de la Klubo, kaj la Komitato estis komisiita komunikiĝi kun aliaj kluboj kaj privataj esperantistoj en la nordaj landoj por la efektivigo de l' afero en la plej proksima tempo.

Sciigo alvenis de la Societo „Espero“ en S. Peterburgo, ke la necesaj aranĝoj estas faritaj por ĝia partoprenado en la Pariza Ekspozicio, kun demando, ĉu la Klubo volas en tio reprezentiĝi per siaj eldonoj.

La propono farita de la Klubo, simile kiel de ceteraj hejmlandaj kaj fremdaj kluboj esperantistaj, al la prezidanto de la Medicina Kongreso en Parizo 1900, prof. Lannelongue, ke Esperanto povu esti uzata en la oficialaj preparoladoj de la es-

tontaj internaciaj medicinaj kongresoj, estis de li akceptita kun favora respondo.

El la raporto pri la Esperanta propagando kaj agado en aliaj landoj oni sciigis, ke ili estis senkompare pli vivaj en la francalingvaj landoj kaj precipe en Francujo mem, kie Esperanto estis ne sole ofte pritraktata en la gazetaro sed ankaŭ preparolita ĉe la Franca Akademiario, multe da publikaj paroladoj kaj kursoj havis lokon, kaj la nombro da membroj de la franca Societo por la propagando de Esperanto pli ol duobliĝis.

En suda kaj norda Ameriko oni komencis interesiĝi pri la afero, kiel ankaŭ en Aŭstralio, precipe en Nova Kaledonio.

Fine estis akcentita la dezirindeco de publikaj kursoj en tiu ĉi urbo dum la estanta printempo. Rilate al tio estis rimarkigite, ke oni intencis fari tian kurson en la loĝejo de la Kristana Societo de Junaj Viroj, kie jam estis elmetita partoprena folio, sur kiu ankaŭ aliaj ol membroj de la dirita societo povu surskribi sin.

Tiu ĉi kurso, pri kiu parolis la gazeto „Upsala Nya Tidning“, ne estis efektivigita, ĉar tro malmulte da partoprenantoj sin surskribis kaj la aranĝoj por ĝi estis faritaj iom tro malfrue, post kiam la aliaj kursoj de la dirita societo jam delonge komencis kaj okupis tute la intereson de la lernantoj. Tial oni devis prokrasti ĝin ĝis la aŭtuno.



La malgranda Petro en la vagonaro.

Sinjinorino Janson vojaĝis antaŭ kelkaj tagoj kun sia malgranda filo Petro en la sama vagono de fervojo kiel neĵuna

sinjoro, kiu estis tre varva, kvankam li ne estis ŝargata de densa harokresko.

— Patrino, — diris Petro montrante per la fingro la sinjoron sur la kontraŭa benko, — tiu estas simila al malgranda infaneto; ĉu li ne estas?

— Silentu, Petro!

— Kial mi devas silenti?

Paŭzo.

— Patrino, kio estas kun tiu sur sia kapo?

— Silentu! Li estas harnuda. (La lasta per subdira voĉo.)

— Harnuda? Kio ĝi estas?

— Li havas neniom da haro sur sia kapo.

— Ĉu patrino estas malĝoja?

— Jes, mi estas; vi tiom multe demandas...

Paŭzo.

— Patrino, rigardu, estas muŝo sur la kapo de tiu.

— Se vi ne silentas, vi ricevos batojn, kiam ni revenis hejmen.

— Rigardu, tie estas ankoraŭ unu muŝo; jen ili batalas.

— Sinjorino, — diris la fremda sinjoro kaj ekrigardis, — la knabo ŝajnas esti iom dorlotita.

Sinjorino Janson ruĝiĝis ĝis sub la haro, balbutis iajn vortojn kaj forglatis la haron de la frunto de sia knabo.

— Patrino, jen nun estas tri muŝoj! ekkriis Petro.

— Aŭdu, mia knabo, — diris la harnudulo, — se vi ne silentas, mi ordonos la konduktoron, ke vi restu en la venonta stacio.

Sinjorino Janson, kiu ne sciis precize kion fari, batis al Petro du fortajn survangojn. Tuj poste li ricevis bonbonojn, por ke li ne plorkriu.

— Patrino, ĉu mi havas tiajn ruĝajn orelojn?

— Vi ricevos ankoraŭ pli da survangoj, se vi ne silentas!

Paŭzo.

— Patrino, ĉu doloras esti harnuda?

— Se vi silentas, mia knabo, — diris la fremdulo, — mi donos al vi 25 oerojn.

Petro ricevis la monon, kaj la harnudulo reprenis sian gazeton kaj daŭrigis legi.

— Kiam mi estos harnuda, — interrompis Petro, — mi donos al ĉiuj knaboj 25 oerojn. Ĉu ĉiuj harnudaj homoj havas multe da mono?

Nun ekfinis la pacienco de l'harnudulo. Li ĵetis la gazeton, ekleviĝis kaj kriis:

— Dankon al Dio ke baldaŭ mi estos hejme! Kiam vi vojaĝos alian fojon, sinjorino, ne prenu kun vi tiun ĉi simiidon. Pli volonte mi veturas en la pakvagono ol en lia akompano.

— Jen la harnudulo estas foririnta; diris Petro. Lia patrino klinis sin malantaŭen kaj elpuŝis profundan ekĝemon.

El sveda lingvo esperantigis P. Nn.



Lingvistikaj mirindaĵoj de la mondo.

Konsiderante la malfacilecon atingi eĉ konatecon kun du aŭ tri lingvoj, ŝajnas al oni nekredeble, ke estas al homoj iaj eble paroli kun la plena fluanteco de nacio en dudek kaj eĉ kvindek fremdaj lingvoj.

Estas nur kelkaj monatoj de tiam, kiam mortis en Bonn en Germanujo la plej fama lingvisto de tiu ĉi generacio

d-ro Gottlieb Leitner. Doktoro Leitner, kiu estis aganta kiel tradukisto legala al la angla armeo en la Krimea militado, povis paroli kun egala facileco ne malpli ol kvindek lingvojn; kaj multajn el la plej komplikaj orientaj lingvoj li konis tiel intime kiel sian patran lingvon germanan.

Sed ekzistis fenomenaj lingvistoj en ĉiuj tempoj, de la malproksimaj tagoj de Mithridates, reĝo de Pontus, kiu sciis paroli kun siaj regatoj en ĉiu el iliaj dudek kvin diferencaj lingvoj; kaj de la tagoj de Kleopatra, kiu neniam uzis tradukiston en siaj rilatoj kun la ambasadoroj de la mondo.

Pico della Mirandola, instruita italo en la dekkvina centjaro, estis elokventa en dudek-du lingvoj; kaj M. Fulgence Fresnel estis malfremda al dudek.

En la deksepa centjaro Nicholas Schmid, germana vilaĝano, tradukis la „Patron Nian“ en tiomajn lingvojn, kiomaj semajnoj estas en jaro; kaj en la sekvanta centjaro Sir William Jones, anglo, povis interparoladi en dudek diversaj lingvoj.

Sir John Bowring konis ĉiun lingvon kaj dialekton en Eŭropo; kaj Solomon C. Malan, angla pastro, kiam li estis dekokjara junulo, povis jam prediki en dektri lingvoj kaj dum sekvantaj jaroj aldonis al sia provizo tiajn diferencajn lingvojn kiel araba kaj valesa (*welsh*), siria kaj ĥina, japana kaj rusa. Lia povo facile majstri novan lingvon estis tiel granda, ke en la daŭro de dusemajno li ellernis la armenan lingvon sufiĉe bone por esti kapabla prediki en ĝi; kaj dummonata studiado ebligis lin prediki en georgia lingvo ĉe nacia kunveno religia en la katedralo de Kutais.

La famo de Elihu Burrit, „la instruata hufforĝisto“, kiu mortis antaŭ dudeko da jaroj, restas ankoraŭ en freŝa memoro en Anglujo. Burrit majstris la latinan, grekan kaj francan lingvojn, ludante sian martelon ĉe la forĝado, kaj li egale facile tradukis islandan fabelon kiel hufŝuis ĉevalon.

La nombro de homoj, kiuj majstris inter dek kaj dudek lingvojn, estas „legiona“. La ĉefo inter ili estas Postel, franca klerulo, kiu konis dekkvin lingvojn, kaj J. J. Scaliger, alia franco, kiu parolis kiel nacio en dektri fremdaj lingvoj. Claude Duret estis majstro de deksep lingvoj; kaj James Crichton, skotlandano, povis disputi science en dekduo.

La plej granda lingvisto de ĉiam tamen estis kardinalo Mezzofanti, kiu mortis antaŭ duoncentjaro. Pri li Byron skribis: „Li estas monstro de lernopovo, la Briareo pri la parolo, iradanta poligloto, kiu devis ekzisti en la tempo de la turo de Babilono kiel universala tradukisto.“

La lingvistika amplekso de Mezzofanti estis tiel granda, ke li povus interparoli en unu diferenca lingvo po ĉiu semajno en du jaroj sen malplenigi sian vortaron. Entute li pli-malpli intime konis 114 lingvojn kaj dialektojn, kaj en la plejparto el ili li povis paroli kun tia akurateco kaj pureco de akcento, ke li povus esti, kaj ofte estis, erare supozita esti nacio.

Lia koneco de lingvo de ia lando estis tiel intima, ke li povis, ekaŭdante la parolon de iu, diri el kia lando aŭ distrikto tiu estis devenanta, kaj povis interparoli kun li en lia propra dialekto, tiel ke li kredigis ke tiu mem estas samprovincano de sia kunparolanto. Li konis ĉian lingvon

kaj dialekton de Eŭropo, eĉ irlandan, valesan, valakan kaj bulgaran. Li intime konis preskaŭ ĉiujn orientajn lingvojn, eĉ samarian, sirian, kaldean kaj saban, kaj li povis paroli koptan, abesinan, etiopan kaj parencajn kun ili lingvojn egale fluante kiel sian patran lingvon italan.

Tiu ĉi stranga „psikologia fenomeno“ estis ne kontenta sole paroli kaj skribi sian centon da lingvoj, li aktuale pensis en ili, unu post la alia. Lia koneco estis por li de senfina utilo en lia donado de religia konsolo al la homoj de multaj diversnacioj en la malliberejoj de la papo. Se je malofta okazo malliberulo parolis lingvon nekonatan de la kardinalo, li tuj ekprepariĝis ellerni ĝin, kaj antaŭ la fino de tri semajnoj li estis kapabla konduki fluantan interparolon en ĝi.

La opinio de la kardinalo estis, ke „la ellernado de lingvoj estas malpli malfacila, ol ordinare estas supozite; ekzistas nur limita nombro da punktoj, al kiuj estas necese direkti la atenton, kaj almajstriĝinte ilin, la ceteraj sekvos kun granda facileco.“

El lingvo angla tradukis

P. Ahlberg.



AFORISMOJ KAJ PRIPENSOJ.

(De la Markizo de Maricá.)

Ĉiuj volas liberecon, multaj ĝin posedas, malmultaj ĝin meritas.

*

La pligranda pruvo de ies sensignifeco estas ne havi eĉ unu malamikon aŭ enviulon.

*

La trouzoj, kiel la dentoj, neniam estas elprenataj sen doloro.

*

Ni malŝparas la tempon, plendante ĉiam, ke la vivo estas mallonga.

*

La malfeliĉoj kiuj fortigas la homojn honestajn kaj virtajn, malfortigas kaj senkuraĝigas la malbonulojn kaj malvirtulojn.

*

Malestimadoj estas, — kaj el kelkaj personoj, — kiuj tre honoras la malestimatojn.

*

La aplaŭdo popola estas kiel la fumo, kiu malaperas en la daŭro de malmultaj momentoj.

*

Neniu estas granda homo pri ĉio, kaj ĉiam.

*

La plej granda bonfaro kaŭzas ordinare la plej grandan sendankemon.

*

Neniu trompas tiom kaj pli ol la Historio.

*

Multaj personoj estas, kiuj, kvazaŭ la eĥo, ripetas la vortojn, ne komprenante ilian sencion.

*

La novaĵoj ne plaĉas al la maljunuloj; la unuformaĵoj al la junuloj.

*

Malsaĝeco kaj senlaboreco nenium riĉigas.

*

La homoj en societo estas kiel la ŝtonoj en arkaĵo: kontraŭstaras, kaj sin helpas samtempe.

Tradukis

A. Caetano Coutinho.



NIĴINO.

Rakonto de N. (el franca lingvo).

Daŭrigo kaj fino.

En la sekvanta mateno la komercistoj invitis de Saido por kafo, alvenis en difinita horo al la edzo de Niĵino.

La kafon oni trovis bonega; poste Saido ekfumis longan tubeton kun bonega tabako kaj ĝentile proponis ĝin al sia gasto.

— Mi volas trovi ion, per kio oni povus vin amuzi, — diris Saido.

— Tiu ĉi estas artifike, — respondis tiu malĝoje.

— Ian ludon . . .

— Mi scias unu ludon, sed en ĝi mi ne havas kontraŭulojn, kun kiuj estus interese batali.

— Mi ankaŭ, — diris Saido; — tiu ĉi ludo estas ŝako.

— Vi ludadis je ŝako? — daŭrigis la komercaĵisto, kaj en lia voĉo oni povis rimarki miregon kaj kompaton.

— Kaj eĉ estas forata en ili.

— Por mi estas interese doni al vi lecionon, — diris la alilandulo.

— Aŭ preni lecionon de mi, — rediris Saido.

Li faris signon al servanto kaj li starigis la tablon inter la du kontraŭuloj, sur kiu jam estis preponitaj la ŝakaj figuroj.

La batalo sinkomencis indifere de l' flanko de Saido, sed la fremdlandulo rilatis al sia brava kontraŭulo tute malame, li en la komenco volis indulgi la kontraŭulon per malgravaj iroj kaj poste venki lin per unu decida puŝo kaj sin amuzi per la mirego de l' kontraŭulo, sed subite samtempe kiam la fremdlandulo, dank' al lerta iro, jam sin preparis por soleni super sia kontraŭulo, la lasta donis al li ŝakon kaj maton, per la sama iro kaj figuro, kun kies helpo la fremdlandulo intencis gajni.

— Mi malgajnis, — diris li, sed kun falsa trankvilo, per kiu li volis kaŝi malsperon kaj ĉagrenon.

— Konfesu, ke la iro estis lerta, — rimarkis Saido.

— Bonega! Konfesu, diru, ĉu estas vere, ke vi prenis la manieron de ia glora ludisto?

— Ho ne, — respondis Saido, — mi instruis min ĉe unu virino.

La alilandulo premis profundan ĝemon kaj sin levis.

— Sed kiam do ni kvitiĝos? — demandis Saido.

— Oni povas eĉ morgaŭ, — diris la komercaĵisto, jam de la sojlo.

— Bone, sed antaŭe ni ludu je ŝako, volu fari al mi la honoron manĝi kun mi.

— De l' animo mi dankas vin. Tiel adiaŭ ĝis morgaŭ!

En la difnita horo la manĝoj estis preparitaj. La alilandulo venis.

La ornamo de l' tablo, la orda vico de l' pladoj alvokis al li nekaŝeblan eksciton, sed Saido pensis, ke tio ĉi estas sekvo de la hieraŭa malgajno. Dirinte kelkajn vortojn, la mastro kaj la gasto faris la levon laŭ la leĝo de Mahometo kaj siĝis al la tablo.

En la finiĝo de l' tagmanĝo oni donis sur la tablon pladon kun granda flava pizo, nomata turka greno.

Vidinte la pladon, la fremdlandulo subite rigardis al la flanko, kie staris servanto ĵus doninta la pladon; tiu ĉi estis maljuna negrino, kaj li eksopiris kun neagrable miro.

— Provu tiun ĉi manĝon, — diris Saido, almovinte al li la pladon, — kaj diru, ĉu ĝi plaĉas al vi?

— Bonege! — respondis la alilandulo, forigante larmon de l' okulharoj.

— Sed vi ploras! — ekkriis Saido malespere, ekbatinte sian fronton; — eble ke tiu ĉi manĝo elvokas ĉe vi neagrablajn rememorojn.

— Kontraŭe! — rimarkis la gasto, kies ekscitiĝo kreskis pli kaj pli, — ĝi rememorigas al mi edzinon, de kiu mi disiĝis.

— Bona edzino vere estas trezoro por la edzo, — diris Saido.

— Kaj mi nun tion ĉi sentas, — konstatis la alilandulo.

Saido aldonis:

— Jen, kvankam min preni por ekzemplo. Mi estas edzigita je dua virino; la unua estis maldiligentulino, malŝparema, kaj mi estis tiel malsaĝigita, ke ne rimarkis, en kian profundaĵon ŝi min pelas, kaj en unu mateno mi restis sen iaj rimedoj por vivo, tute ruiniĝinta. Mi ŝin elsendis al ŝiaj parencoj kaj de tiu tempo mi nenion aŭdis pri ŝi. Poste en tre strangaj cirkonstancoj mi ricevis la duan edzinon; ŝi per ŝia amo al ordo, per sia ŝparemeco kaj bona moro ree redonis al mi la bonstaton kaj feliĉon. Mi estis malprudenta kaj malŝparulo; sed ŝi faris min prudenta kaj serioza.

— Kun saĝa edzino ankaŭ la edzo estas saĝa, — eksonis voĉo.

— Niĵino! Niĵino! ho, pardonu min! — ekkriis la alilandulo, ne memorigante sin pro ĝojo kaj pro eksciteco.

— Tiu ĉi alilandulo estas Mazodo, — diris Niĵino, formetinte la vualon kaj sinturnante al Saido; — li estas via bonfarulo kaj mia eterna potenculo, — aldonis ŝi, klininte unu genuon antaŭ Mazodo.

— Saido, redonu al mi mian edzinon, — kun petego diris Mazodo, levante Niĵinon.

Saido rigardis Mazodon, kiu estis nerekoncible, ĉar malĝojo ŝanĝis liajn trajtojn: li maljuniĝis tiom, kiom Saido rejniĝis per restarigita forto kaj feliĉo. Poste Saido ekrigardis Niĵinon, palan, tremantan,

ekscititan: la juna virino kvazaŭ atendis la juĝon al morto aŭ pardonon, li direktis la okulojn al la tero, pensis unu minuton kaj poste ne levante la okulojn, diris:

— Niĵino apartenas al vi, mia sinjoro, — kaj sinlevinte, li lasis ilin solaj.

— Nun vi povas, kiom vi volas, ripetadi vian amatan sentencon, kara mia Niĵino, — diris Mazodo, alpremante la edzinon al sia brusto.

— Ĝi kostas al mi tri jarojn da vivo, mia edzo kaj potenculo, — rediris Niĵino, kaj neniam plu mi ripetos ĝin.

Tradukis

E. Radvan Rypinski.



La stelo Betlehema.

(De Viktor Rydberg.)

En okcident', ho stel'
Ekbruligita, *)
Lumu sur la ĉiel'
Senkovrigita!
Vin la paŝtista ar'
Sekvas volema,
Stel' Betlehema.

Nokt' super Juda land',
Nokt' super Zion, —
Ĉe l' okcidenta rand'
Mortas Orion.
Dormas l' infan' en pac'
En la dometo,
Kaj la paŝtist' en lac'
Sur la monteto; —
Vekas de l' voĉoj ĥor'
Ilin miranta,

*) — — — — —
— — — — —

Lumas en nokta hor'
 Stelo brilanta.
 Por la Edena cel'
 Homoj foriras,
 Vojon en nokt' la stel'
 Al ili diras
 Tra la bariloj for
 De la vivado
 Ĝis la pordeg' el or'
 De l'feliĉado.
 Tie anĝeloj jam
 Brakojn etendas
 Kaj el la buŝ' en am'
 Vokon alsendas:
 „Montras ne for la stel',
 Hejmen nur ĝia cel'!“
 Vin la paŝtista ar'
 Sekvas volema,
 Stel' Betlehema.

Sig. Agrell.



La arabo, kiu ludas ŝakon kun Allah.

(Hispana anekdoto.)

En la tempo de Maŭroj vivis inter la muroj de Cordova,*) konata pia viro, kiu per siaj bonfaroj fariĝis konata ĉie, kie hispanoj aŭ maŭroj loĝis, laŭ nomo: Don Hurtado Garcias Ecequias Eleazaro de Estalimena el señor beneficentísimo, — aŭ kiel la popolamaso lin nomis: Alabado sea Dios (dank' al Dio!) Tiun ĉi nomon li aŭdis la plej volonte, ĉar ne pasis tago, ne aŭdante tiun ĉi nomon el la buŝo de la malriĉuloj, kiujn li helpis laŭ povo.

*) Kordova.

Sed ĉar liaj enspezoj ne estis tro grandaj, li vokis por helpo la riĉulojn. Li havis tutan katalogon el la nomoj de la grandoj, hidalgoj kaj caballeroj*). Tiujn Don Hurtado vizitis ĉiujare, severe postulante de ili la jaran pagon.

Oni timis ankaŭ pli bone de li, ol de la Maŭroj.

— Don Estéban! vi havas jaran enspezon da dekmil realoj, volu ne forgesi pri tiuj, kiuj havas nenion.

— Jes, sed mi perdis dumil realojn...

— Kiu gajnis ĝin?

— Don Gedonio kaj Don Cristobal.

— Se vi estis kapabla perdi dumil realojn, vi povas doni ankaŭ por la malriĉuloj ducenton.

Don Estéban pagis kun malgaja mieno. Laŭ vico venis Don Gedonio kaj Don Cristobal.

— Ustedes**) profitis ĉe la bov-batalado en la areno dumil realojn; Don Estéban, kiu perdis ĝin, jam donis ducenton da realoj, estas konvena, ke ustedes, kiu gajnis ĝin, donu duoblan almozon.

Ustedes skrapis la kapon kaj pagis.

Alitempe li renkontis, sur la strato de Madrido, kun Don Lorenzo Mendoza di Valencia.

— Ilustrísimo Señor. Mi aŭdis, kian belan predikon vi parolis pri la virto de la bonfaremo, en la tago de Todos-los-Santos.

— Vere? ĉu ankaŭ en Cordova oni parolas pri tiu?

— La tuta lando parolas pri tiu, kaj en mia entuziasmo por ĝi mi ne povis vin ne viziti kaj petegi...

— Ĉu mi montru mian predikon? Plej volonte.

*) Elparolu: kaŭaljero = sinjoro.

**) Usted, ustedes = vi.

— Por Dio, ne tial, sed mi petas kvincent moidorojn por miaj malriĉuloj.

Don Lorenzo prenis malgaje sian monujon:

— Sed jam nun anda con el diantre! . . .

Iam en sia vojo, li venis en grandan arbaron; jen li rimarkis arabon, kiu sidis sur la vojo kaj sola ludis ŝakon.

Oni scias, ke la plej granda malebleco estas: sola ludi ŝakon.

Don Hurtado miregante haltis antaŭ la arabo, rigardante, kion li faras.

Estis videbla, ke la ludo tre interesis la arabon. Don Hurtado ne povis lin ne demandi:

— Kies filo vi estas, pia viro?

La arabo faris ankoraŭ unu tiron kaj respondis:

— Mian patron oni nomis Ben-Mutassem, kaj mi estas Abu-Rizlan, se vi scii volas, pia kristano.

— Kion vi faras tie ĉi, bona Abu-Rizlan, filo de Ben-Mutassem?

— Kiel vi vidas, mi ludas ŝakon.

— Sola?

— Mi ne estas sola.

— Kiu do estas la dua?

— La ĉiupova granda Allah.

— Vi do havas potencan kontraŭulon.

— Justan kontraŭulon.

— Kiu gajnas nun la ludon?

— Ŝajne, mi perdos ĝin . . . Nu, ĉu mi ne diris? Ankoraŭ unu movo, kaj mi perdis ĝin. Hodiaŭ mi ne povas plu ludi.

— Kial?

— Ĉar mi perdis mian monon.

— Vi do ludas kun Allah en mono?

— Jes; mi nun perdis kvindek moidorojn kontraŭ Allah.

— Kiel vi donas tiun monon al Allah?

— Tiam, kiam mi perdas la ludon, Allah ĉiam sendas al mi pian viron, al kiu mi donas la sumon por donaci ĝin al la malriĉuloj. En la nuna horo, mi kredas, vi estas tiu ĉi viro, — prenu la kvindek moidorojn.

Don Hurtado ĝojis, pensante, ke tiu ĉi estas tre pia ludo; kaj poste li trairadis Hispanujon; revojaĝante ne forgesis viziti la arabon por demandi, ĉu li ree ne perdis la ludon.

Vere, li trovis lin sur la vojo sidante, antaŭ li la ŝaktablo.

Don Hurtado haltis kaj atendis, dum la ludo havas finon.

— Ĉu vi perdos hodiaŭ la ludon, Abu-Rizlan?

— Ho ne! hodiaŭ mi havas feliĉon. Ankoraŭ unu movo kaj mi gajnis ĝin.

— Tre bela. Vi do nun gajnis.

— Jes, mi gajnis de Allah *kvincent* moidorojn.

— Sed kiu elpagas por vi tiun ĉi sumon?

— En tiu okazo Allah sendas al mi pian viron, kiu elpagas la gajnitan sumon. En la nuna horo, mi kredas, vi estas tiu viro.

Tion ĉi dirante, la pia arabo direktis pistolon al la brusto de la tremanta Don Hurtado, — kaj devigis lin tradoni sian monujon.

— Alabado sea Dios! — diris la arabo, elpreninte el la monujo kvincent moidorojn, redonante la pluan.

— Nu, min ne sendos Allah ree al vi!

Tradukis el la lingvo hungara: L. de Makay.



ADRESARO DE NIAJ ABONANTOJ.

La numero, metita antaŭ ĉiu nomo, estas la kuranta numero, sub kiu la abonanto estas enskribita en la libro abona ĉe la administrado de nia gazeto en Szegzárd.

Argentino :

235. Gösta Erasmie, La Compania Escandinavia Argentina Ltd, General Hornos 1359, Barracas Al. Norte, en Buenos-Aires.

Aŭstrujo :

104. Sydney Sadowsky, Bema 18, en Lemberg (Galicien).
 138. Rudolf Sperl, pens. k. k. Beamter, Waasen 20, en Leoben (Steiermark).
 139—140. Josef Socha, princa bien-adjunkto en Feldsberg (Nieder-Österreich) [2 ekzempleroj].
 141. Karl Wagner, instruisto, en Siebenhirten ĉe Mittelbach (N.-Ö.)
 142. Fraŭlino Rud. Hansel, — Schloss Liechtenstein, poŝto : Maria Enzensdorf (N.-Ö.)
 143—152. Josef Wagner, princa bien-adjunkto, en Feldsberg (N.-Ö.) [10 ekz.]
 212—214. A. B. de Brzostowski, ĉe la banko Galicia por komerco kaj industrio, en Krakau (Galicien) [3 ekz.]
 247. Josef Forkarth, en Josefov = Josefstadt (Böhmen).
 248. Friedr. Brych, en Josefov = Josefstadt (Böhmen.)

Belgujo :

96. Josef Jamin, 69, rue des Drapiers, en Bruxelles.
 97 kaj 112. Esperantista Grupo, Cercle Polyglotte, Hôtel Ravenstein, en Bruxelles (2 ekz.)
 98. Fernand Chaufoureau, Ch. de Bruxelles, 137, en Forest lez Bruxelles.
 169. Fraŭlino Greiner, 102, Chaussée de Charleroi, en Bruxelles.

181. Gaston Chotiau, 3, rue de Bériot, en Bruxelles.

208. Sous-lieutenant Léopold Jamin, au 7^{ème} régiment de ligne, en Anvers.

Brazilujo :

261. A. Caetano Coutinho, en Sete Lagoas, Minas Geraes.

Bulgarujo :

- 66—67. M. M. Abesgus, Banque Industrielle de la Russie Méridionale, en Sophia (2 ekz.)
 196. Svetoslav Iv. Maneff, medicina feldŝero, en Kotel.
 197. Vasil Todoroff, instruisto, en Ĵeravna.
 198. G. P. Oreškoff, telegrafisto, en Philippopol.
 251. V. P. Uzunskij, en Ŝiroka-Loka — Rupĉos, Philippopol.
 252. K. Bojnov, École d'agriculture, en Plevna.
 253. Hr. Popov, en Tirnovo, Dolna-Orehovitza.
 254. B. Sultanof, en Gorna-Orehovitza.

Finlando :

1. kaj 14—50. Aug. Th. Laurén, en Jyväskylä (38 ekz.)
 2. Theodor Sunell, en Kannus.
 3. Georg Englund, kollegiiråd, en Uleåborg.
 4. Hjalmar Vialén, " "
 5. Gösta Englund, " "
 6. Fraŭlino Ida Melart, en Kannus.
 7. N. Eskola, en Vasa, — adr. Viséns kontor.
 8. V. L. Gyllenbögél, en Vasa, — adr. Nya Apoteket.
 9. V. Lönnquist, en Lapua.

10. Iivari Forsman, en Nykarleby.
 11. Väinö Englund, (adr. Handelsinstitutet), en Brahestad.
 12. Fraŭlino H. Tennander, en Brahestad.
 13. S-rino Lyydi Forsman, assessorska, en Åbo, Biskopsgatan 6.
 205. Georg Fraser, en Imatra.
 217. Rolf Nordenstreng, fil. kand., en Helsingfors, Richardsgatan 2.

Francujo :

65. Sam. Meyer, ŝipa makleristo, en La Rochelle.
 137. Elbér No, en Fontenay s/s Bois.
 199. Marcel Cahen, 7, rue des Templiers, en Reims.
 200. Paul Berthelot, 72, rue de l'Université, en Reims.
 237. Paul Tennéson, rue Cassini 16, en Paris.
 243. L. de Beaufront, en Epernay (Marne).
 244. René Lemaire, " " "
 245. Henri Bel, 8, rue de la Tour Gayeaud, en Montpellier (Hérault).

Germanujo :

103. Dr. Ad. Ebner, en Königsberg i. Pr., Lobeckstrasse 14 II.

Holandujo :

190. Fraŭlino Catharina van Zon, 27, van Speykstraat, en Haag.

Hungarujo :

60. L. de Makay, en Lőcse, Uj-uteza 20.
 168. Lud. Vargha, kunsidanto de l' distrikta ofico de orfaj aferoj (árvaszéki ülnök), en Szegzárd.
 195. Adalb. Stef. Kiss, instruisto, en Ócsény, Tolnamegye.
 204. Redakeio de la „Sadašnost“, en Nagy-Kikinda.

258. Abel Barabás, ĵurnalisto, en Kolozsvár.
 260. Fraŭlino Louise Bihari, en Budapest, Külső-kerepesi-út 28. sz. I. em.
 263. Adolf Altenburger, profesoro ĉe la ŝtata komerca lernejo (állami felső kereskedelmi iskolai tanár), en Szeged.

Italujo :

99. Dr. Daniele Marignoni, en Crema.

Kanado :

250. F. X. J. Solis, abato ĉe la seminario, en St.-Hyacinthe P. Q.

Norvegujo :

157. Haldor Midthus, en Lysekloster, — Bergen.
 158. Lensmand, H. O. Svenke, en Os, — Bergen.
 159. J. Kaŭrin, arbarmaistro, en Söfteland, — Bergen.

Portugalujo :

170. Dr. M. R. da Costa e Almeida, en Rezende.
 171. Dr. J. J. da Cruz Capello, en Albergaria.
 172. Dr. Albano L. R. de Magalhaães, en Rezende.
 173. Honorato José da Matta, en Loures-Lisboa.
 174. José E. da Costa Couceiro, en Rezende.

Rusujo :

68. J. Abesgus, en Ĥerzon, Privoz, dom Meeroviĉ.
 69—70. H. Ŝtalberg, en Vezenberg, gub. de Estland (2 ekz.)
 86—95. F. A. Postnikov, inĝeniero, en Vladivostok (10 ekz.)
 100. B. Kaplan, Ŝilderovskaja ulica, dom Brudnera, en Dvinsk.

102. E. Radvan-Rypinski, en Lodejnoje Pole, gub. Oloneckaja.
- 105—107. J. H. Vaňtrik, en Reval (3 ekz.)
- 119—121. Dr. Konstant. Ivanov Ŝidlovskij, en Moskva, Deviĉje Pole, Trubeekoj pereulok, d. N^o 10, Pravlenie Pirogovskago Obŝĉestva (3 ekz.)
128. N. Rodionov, en Nijni-Novgorod.
- 129—130. A. N. Surov, en Sizran (2 ekz.)
131. D. A. Surov, gimnaziano, en Simbirsk.
133. Aleksandro Avsenev, en Buturlinovka, gub. de Voroneĵ.
134. V. Tacievski, en Simferopol.
135. M. Jezerski, en Volkovisk, gub. de Grodno.
- 153—154. V. Laskin, Progimnazio, en Roslavl, gub. de Smol. (2 ekz.)
155. I. I. Miaskov, en Rovno, gub. de Volhynie.
160. Stanislav Slavomir Kozlovski, en Dombrova Gornica, (stacio de fervojo Varsovia-Viena), str. staro Poĉtova, oficejo de s^{ro} Lesievski.
162. Fraŭlino Vera S. Maĥĉeviĉ, en Lida, gub. de Vilenskaja.
163. Konstantin Fardi, Meĉetnaja ul. 9, en Simferopol.
164. Klimov, ŝtabkapitano, Junkerskoje uĉiliŝĉe, en Kazan.
- 166—167. Ivan Ŝirjaev, *St. Ŝestiĥino*, Rybinsko-Bologovskoj ĵel. dorogi, — *Selo Vereteĵa* (2 ekz.)
175. Sergej Ivanoviĉ Kondakov, Ljesnoj sklad., en Melitopol, gub. Tavriĉeskaja.
176. Konstantin Ivanoviĉ Zabnin, Uĉitel Melitopolskaho Realnaho uĉiliŝĉa, en Melitopol, gub. Tavriĉeskaja.
177. Ivan Nikolajeviĉ Podrjabinnikov, librotenanto, Melitopolskaho Gorodskoho Obŝĉestvennaho Banka, en Melitopol, gub. Tavriĉeskaja.
178. Timofej Ŝĉavinski [adreso de n-ro 177]
179. L. I. Kakurin, inĝeniero, Stalelitejnij zavod, en Ekaterinoslav.
- 182—188. N. Pavlovski, en Ŝostka, Ĉernigovskaja gub. (7 ekz.)
191. K. Tripolski, en Berdiĉev, gub. de Kiev.
192. Vladislav Adolfoviĉ Minkjeviĉ, en Orgejev, gub. de Bessarabien.
193. P. A. Dombrovski, profesoro de la pastra katolika seminario, en Kovno.
206. Greguar Slucki, en Elisavetgrad.
207. A. K. Burenkov, Vasili Ostrov, 13-a linio, d. N^o 34, loĝ. 9, en S. Peterburgo.
209. La societo „Espero“, Kazanskaja 26, loĝ. 52, en S. Peterburgo.
210. V. Rogaĉev-Antonov, Kazanskaja 26, loĝ. 52, en S. Peterburgo.
211. I. T. Sergejev, Pivovarenni zavod, (bierofarejo), en Tambov.
218. Fr. Ender, en Wilczków p. Dobra, (gub. de Kalisz).
222. Václav Reiner, en Rjazanj.
223. Andreo Pugaĉov, en Rjazanj.
224. M. Borisov, en Kaŝira.
230. Karl Bezin, instruisto de 1^a kadeta korpuso, en Orenburg.
236. Dr. L. Zamenhof, en Varsovio = Warszawa, ul. Dzika N^o 9.
259. B. Golubov, (adr. de subkolonelo Baktin), en Orel, kadetski korpus.

Svedujo :

- 51—53. Fraŭlino Hilda Cederblad, Fröberga, en Öferselö (3 ekz.)
54. S. E. Krikortz, med. kand., en Stockholm, Schéelegatan 9.
55. Karl Boman, en Stockholm, Kungsholmsgatan 44. I.
56. Hjalmar Källberg, en Stockholm, — Handtverkargatan 24 B III.

57. Erik Tollén, en Stockholm, Flemminggatan 26.
58. Henning Norin, en Perstorp.
59. Nath. Kyhler, en Köinge.
61. Karl Ekström, en Stockholm, Upplandsgatan 13 A I.
62. Engelbrekt Olson, inĝeniero, en Stockholm, Pipersgatan 11 III.
63. Harald Johanson, en Stockholm, Regeringsgatan 24.
64. Ragnar Ström, en Hernösand.
71. Rondeto Esperantista, en Karlskrona.
- 72—73. kaj 262. Dr. Ad. Nilsson, en Karlskrona, Ronnebygatan 25. (3 ekz.)
- 74—76. kaj 84—85. Dr. I. Asklöf, en Karlskrona (5 ekz.)
- 77—78. Dr. V. Petersson, lektoro, en Karlskrona, V. Amiralitetsgatan 8. (2 ekz.)
79. Dr. V. P. F. Ljunggren, en Karlskrona, Kyrkogårdsgatan 14.
- 80—81. F. E. Mellander, en Karlskrona (2 ekz.)
- 82—83. C. G. Hofling, en Karlskrona, Drottninggatan 27. (2 ekz.)
101. August Billkvist, adr. H. B. Abel, en Stockholm.
107. Fraŭlino Anna Hultén, en Kalmar.
108. S-rino Hanna Råberg, en Kalmar.
109. Klubo Esperantista, en Stockholm, Döbelnsgatan 50.
110. B. Fischer, en Stockholm, Regeringsgatan 93 A.
111. A. Nordwall, roteman, en Stockholm, Hornsgatan 26.
113. Fraŭlino Maja Fornander, en Stockholm, Olofsgatan 5.
114. Anders Roswall, en Stockholm, Stureparken 5.
115. A. V. Magnusson, en Stockholm, Hölandaregatan 22.
116. V. Bengtsson, e. o. hofrättsnotarie, en Stockholm, Nybrogatan 16.
117. P. Ahlberg, en Stockholm, Döbelnsgatan 50.
118. S-rino Caroline Wieslander, Tockarp, en Förslöf.
122. Dr. Ernst Westerlund, en Enköping.
123. John Johansson, bienisto, en Jerna.
124. Adam Ramström, ĉefo de bierfabriko, en Södertelje.
- 125—126. Ellert Johnsson, Pilkrog, en Jerna. (3 ekz.)
132. Emil Rosén, en Södertelje.
136. Ernst Halling, Telegrafan, en Stockholm.
161. S-rino M. Rossander, Bangårdsgatan 9.
165. Erland Ling, en Gefle.
180. Olof Kinberg, med. kand., en Stockholm, Södra Blasieholmshamnen 2.
194. Fraŭlino Anna Rosenbaum, en Stockholm, Hagagatan 13.
201. Fraŭlino Hertha Johanson, med. kand. en Stockholm, Wallingatan 30.
202. Hjalmar Forssner, med. kand., en Stockholm, Tegnérsgatan 6.
203. Joh. W. Sterner, en Markaryd.
215. C. Karlsson, notario, en Sundbyberg.
219. W. Örtenholm, inĝeniero, en Höganäs, Brukskontoret.
220. K. B. Vestman, en Upsala, Sysslomansgatan 16.
221. I. I. Süsmuth, en Södertelje, Storgatan 32.
225. Fraŭlino Signhild Vetterlind, en Horn.
226. Albin Zachrisson, en Upsala, Sysslomansgatan 16.
227. Sigurd Agrell, en Upsala, Svartbäcksgatan 4.
228. Klubo Esperantista, en Upsala.
229. Ejnar Fröberg, en Hernösand, Kronholmen.
- 231—233. Hjalmar Bäckström, en Örnsköldsvik (3 ekz.)

234. Erik Lindström, Altappen, en Luleå.
 238. Filip Langlet, inĝeniero, en Stockholm, Brunnsgatan 28.
 239. Fraŭlino Lojla Löfving, en Stockholm, Vestmannagatan 60.
 240. C. A. Lindén, en Stockholm, Döbelnsgatan 50.
 241. Gustav Lindquist, en Skattungbyn.
 242. Ludvig Klingén, en Stockholm, Brunkebergsgatan 9.
 246. S-riĉo A. von Gedda, Fiskeboda, en Äs.
 249. Dr. J. U. W. Jacobsson, en Dalarö.
 255. Fraŭlino E. Borg, en Stockholm, Döbelnsgatan 16 A, 2 tr., en Stockholm.
 256. E. Hollinder, en Gefle, Rådmanngatan 6.
 257. H. Pleijel, inĝeniero, Telegrafan, en Stockholm.

Unuigitaj Ŝtatoj Amerikaj:

127. R. H. Geoghegan, P. O. Box 84, en Eastsound (Washington).
 189. Edward L. Steckel, en Doylestown Penns.
 216. I. Sauter, 258 Hudson Ave, en Chicago I. U.

(Daŭrigota.)

ESTONTAJ MONDLINGVOJ.

Angla aŭtoro en ĵurnalo prezentis profetaĵon, ke post 300 jaroj de nun la mondo estos konanta nur tri lingvojn: anglan, rusan kaj ĥinan. La angla lingvo estos parolata ĉie en norda kaj suda Ameriko, en Aŭstralio, Hindujo, Afriko, Nova Zelando kaj en la insuloj de Aŭstralio kaj Oceano Pacifika. La rusa lingvo estos venkinta la tutan Eŭropon, escepte Granda Britanujo, kaj tutan Azion, escepte Hindujo. La ĥina lingvo estos reganta super la ceteraj partoj de la mondo.

P. Ahlberg.

HUMORAĴO.

La rebato. Malgranda Karlo plendas:
 — Patrineto! Desidero batis min.
 — Ĉu ĉi ne rebatis lin, kara mia filo?
 — Ho jes, patrineto; eĉ pli antaŭe!

Senkulpigo. Estas nebela de via parto ke vi nun redonas al mi mian pluvombrelon, antaŭ kvin tagoj prunteprenitan.

Pardonu, kolego; mi ĝis nun bezonis ĝin, ĉar de tiam pluvis ĉiam.



INFORMEJO DE ESPERANTISTOJ.

Deziras korespondadi kun eksterlandaj esperantistinoj kaj esperantistoj: s-ro Adolf Altenburger, profesoro en Szeged, Hungarujo. (Adreson vidu sur la paĝo 28, 2-a kolono. *)




Rebusoj.

De Paul de Lengyel.

I.

II.



III.

B D D D E Aranĝu el tiuj ĉi literoj
 E E I I la sekvantajn vortojn, en ori-
 O O O ginala formo triangula:
 O R 1) besto; 2) la cerbo nas-
 R kas tion ĉi; 3) vorteto por es-
 primi ripeton; 4) konjunkcio
 kaj 5) litero. La vortoj legataj de mal-
 dekstre al dekstre kaj de supre al malsupre
 egalas unu kun la alia.

La solvojn de tiuj ĉi rebusoj ni presos en la maja numero. — Ni petas tiujn inter la legantoj, kiuj sin interesas pri tio, ke ili alsendu la solvojn al la **administrado** de nia gazeto. La nomojn de la solvintoj ni presos kune kun la solvoj mem.

Oni povas ensendi ankoraŭ la solvojn de la rebusoj enpresitaj en la n-ro 1.



*) Similajn informojn de niaj abonantoj ni presas senpage en tiu ĉi rubriko. Tiajn enportoĵojn oni volu sendi al la administrado de nia gazeto.

A N O N C O J.

Esperantistoj!

Disvastigante la konadon pri Esperanto oni akcelas la tutan aferon Esperantan. Unu maniero estas uzi ĉiam propagandajn kovertojn. Tiaj en sveda lingvo estas riceveblaj en Svedujo ĉe la Klubo Esperantista Upsala, — en Finlando ĉe s-ro Aug. Th. Laurén en Jyväskylä, kaj kostas nur kr. 1 (Fmk. 1:40 p.) po 100, al kio sin almetas la poŝtopago.

Finlandaj Esperantistoj, kiuj intencas akiri amatorajn fotografiajn aparatojn, estas petataj observi, ke tiaj, kune kun necesaj ĥemiaĵoj kaj uziloj, estas akireblaj ĉe ni je moderaĵ prezoj, krom kio al esperantistoj estas permesata rabato da 5%. — Postulu kostotabelojn!

Jyväskylä Rohdoskauppa
en JYVÄSKYLÄ.

Restantaj jarkolektoj de „Lingvo Internacia“ 1899 (malgranda nombro) estas riceveblaj ĉe mi. Kosto: svedaj kronoj 1.50 = francoj 2.—

Hjalm. Bäckström
Örnsköldsvik (Svede).

LA SVEDA MARKURACEJO

A R V I D S V I K.

Situacio en la insularo de Bohuslän, konata per sia neordinara kaj bela naturo. *Sezono*: 6 junio — 1 sept. — Vaporŝipa, 2-hora veturo de Göteborg. — Ĉiuj kutimaj banoj, malvarmaj kaj varmaj (pinifoliaj, ŝlimaj, de Kreuznach, de Nauheim k. t. p.) Eksterordinare bonaj okazoj por velado kaj fiŝkaptado. Unuaklasa restoracio. Malgrandaj elspezoj. — Por mendi ĉambrojn kaj por ĉiuj pluaj sciigoj volu adresi:

Kamrerarekontoret, Arvidsvik, Marstrand
(Svedujo).

Oni korespondas kaj parolas esperante.
Anna Krikortz.

Ĉe la KLUBO ESPERANTISTA en UPSALA estas aĉeteblaj:

Jarlibro Esperantista 1897, eldonita de la Societo „Espero“ en S. Peterburgo. Kostas 1 frankon.

Libro de l' Humoraĵo de Paŭlo de Lengyel. Tre rekomendinda verko, precipe uzbla kiel ekzerca lego de komencantoj. Kosto 3 fr.

== PRESEJO ESPERANTISTA. ==

PAUL DE LENGYEL, SZEGZÁRD (HUNGARUJO). — ENTREPRENAS LA FARADON DE ĈIUSPECAJ PRESAĴOJ.

BONA LABORO.

MODERAJ PREZOJ.

Tiuj estimataj esperantistoj, kiuj intencas varbi abonantojn por nia gazeto, volu kompleze sciigi pri tio ĉi la administradon, kiu volonte sendos al ili kelkajn ekzemplerojn de la L. I.

El la presejo de Paul de Lengyel en Szegzárd, Hungarujo.